

Th. Kilian

Momentoĵ el la vivo de d-ro Esperanto.

*Elsendita la 4-an de decembro 1935 de la radio-stacioj Brno, Praha I kaj Moravská Ostrava.*

- La personoj:
1. La leganto de la enkondukaj vortoj.
  2. La rakontanto.
  3. La patro de Zamenhof.
  4. La patrino de Zamenhof.
  5. Zamenhof – knabo.
  6. Zamenhof – viro.
  7. La fianĉino de Zamenhof.
  8. La kunvojaĝanto de Zamenhof al Bulonjo.

*Al fraŭlino Lidja Zamenhof, la filino de nia Majstro, mi dediĉas tiun ĉi manuskripton kiel esprimon de mia alta estimo.*

*Třebíč, la . . . de decembro 1935. Theodor Kilian*

Momentoĵ el la vivo de d-ro Esperanto.

Sonbildo al la 76. datreveno de l' naskiĝtago de Zamenhof.

*Enkonduka rusa muzikaĵo, ludita de rusaj balalajkistoj. (Kapelo – ne disko!)*

Enkondukaj vortoj (*úvodní slova*): "En la mondon venis nova sento. " Per tiuj ĉi vortoj komenciĝas nia himno. Ili elŝprucis el homa koro plej pura kaj sentema, kiu estis plene malfermita al la doloroj de l' homo suferanta, kiu respondis al la maljustaĵoj de l' mondo en plej nobla maniero: ĝi serĉis rimedon, por ke homo komprenu homon. Firme ĝi kredis, ke la reciprokan kompreniĝon sur neŭtrala lingva fundamento sekvos la bona volo, kiu por ĉiam forigos el la rilatoj inter popoloj malamon kaj perforton. Tiu ĉi nobla koro ekbatis antaŭ sepdek-ses jaroj, en monato, kiam la kristana mondo atendis la ĉarman feston de l' kristnasko.

La rakontanto (*vypravěč*): Estis vintra nokto. Neĝo, blanka, pura neĝo kovris la kamparon. La tero ripozis, ĝi dormis kaj sonĝis pri floroj de l' printempo. Neaŭdebla estis ĝia spiro. Nur de tempo al tempo ĝi profunde ekspiris. Kaj tiam eksaltis kaj ekdancis la neĝeroj portataj per flugiloj de facila vento. (*deska: slabý vítr; disko: malforta vento!*) Ĝi portis la kristalajn miraklojn de l' vintro trans senfinajn ebenaĵojn, trans vilaĝojn kaj urbojn. Ĝi alkuris la urbon Bialystok. Ĝuste super la domo numero ses en la Verda strato ĝi plumblovis siajn vangojn (*silnější – pli forta!*) kaj gaje ekfajfis al la neĝeroj kirliĝantaj ĉirkaŭ la kamentubo en senbrida petolemo. Sed la domo el firmaj traboj estis varma kaj sekura nesto al junaj geedzoj kaj ilia infaneto. La juna patro alpaŝis la fenestro, el kiu disverŝiĝis flava lumfasko en la nokton. Li ĵetis rigardon en la mallumon, riglis pli firme la fenestron kaj reiris al la tablo. La juna patrino kantlulis sian etulon (*rusa lulkanto*).

Lulas vin, knabeto, panjo via.

Dormu dolĉe, knabo mia.

Lulas vin, knabeto, panjo via.

Dormu dolĉe, knabo mia,

lulas vin, knabeto, panjo via.

La patro: (*mallaŭte-tiŝe*): Ĉu la etulo jam dormas?

La patrino: Jes, ĵus li ekdormis . . . kion vi ankoraŭ skribis?

La patro: Mi notis nur lian naskiĝon. Aŭskultu: la dekkvinan de decembro de la jaro mil-okcent-

kvindek-naŭ naskiĝis nia unua filo. Lia nomo estas Ludoviko Lazaro.

La p-ino: Ho, . . . L u d o v i k o L a z a r o . . . tiel vi, mia floreto, nomiĝos, kiam vi estos granda, forta viro kiel via patro. Sed nun vi estas mia eta Ludoĉjo, Luĉjo. Paĉjo, rigardu la dolĉajn fingretojn, ho, kaj la buŝeton kaj jen, nazeton li preskaŭ tute ne havas. . . kiel pupo.

La p-ro: Ne, mia kara, ne pupo, malgranda sed vivanta miraklo estas infano, miraklo de l' eterne juna naturo.

La p-ino: La bona dio scias, kia estos lia vivo kaj sorto.

La p-ro: Rigardu lian altan frunton! Nu, eble, ke li fariĝos viro riĉa kaj potenca. . . aŭ klera kaj fama. Kiu kapablas diveni, kio dormetas post tiu ĉi frunteto. . .

La p-ino: ... kaj en la koreto. Riĉa, potenca, klera kaj fama, ho, kiel alten vi celas. Mi dezirus, ke la bona dio faru lin homo bona kaj kontenta.

*(Lulkanto de Smetana)*

La rakontanto: Senhalte kaj eterne turniĝas la rado de l'tempo. Sepfoje ornamiĝis de tiam la naturo per floroj alportante al la homoj ĝojon kaj kantojn kaj panon kaj sepfoje ĝi ripozis sub la varma tavolo de neĝo. El la etulo fariĝis knabeto observema, pensema kaj demandema.

Zamenhof (sepjara knabo): Kaj paĉjo, la rusoj estas bonaj homoj, ĉu ne?

La p-ro: Jes, same kiel ni.

Z.: Sed ankaŭ la germanoj kaj poloj estas bonaj homoj, ĉu ne?

La p-ro: Jes, certe, same kiel la rusoj.

Z.: Kial ili do malamas kaj malŝatas unu la alian?

La p-ro: Ĉar ili parolas diversajn lingvojn.

Z.: Kial ili ĉiuj ne parolas unu lingvon, kiam ili loĝas en la sama urbo?

La p-ro: Nu, kiun lingvon ili parolu?

Z.: La rusan!

La p-ro: Kial ne la polan, kial ne la germanan?

Z.: Paĉjo, ĉu la poloj kaj la germanoj neniam iĝos rusoj?

La p-ro: Ne, neniam.

Z.: Kial ne?

La p-ro: Ĉar ili ne volas.

Z.: Ĉu ili do ĉiam malamos unu la alian?

La p-ro: Jes, verŝajne jes.

Z.: Nur pro la lingvo?

La p-ro: Jes.

\*\*\*\*

La rakontanto: La respondo de l' patro ekokupis la knabon kaj li silentiĝis. Li plej amis la rusan lingvon. Li eĉ revis iam fariĝi granda rusa poeto. Dekjara li jam skribis kvin-aktan tragedion. Jen kial li proponis la rusan. Sed la patro demandis: Kial ne la polan, kial ne la germanan? Dek jarojn li serĉis la respondon al tiu ĉi demando. Fine li respondis: Nek la rusa, nek la pola, nek la germana, nek iu alia ĝi povas esti. Ĝi devas esti lingvo neŭtrala, al neniuj popolo apartenanta. Ĝi devas aparteni al ĉiu kaj neniuj. La problemon, pri kiu revis Komenský, pri kiu vane klopodis Leibniz kaj Descart, solvis junulo deknaŭ-jara. Kun siaj amikoj, ĉe samovaro kaj kuko kaj kantoj, li festis la tagon "de vivigo de la lingvo universala".

\*\*\*\*

*Zpěv, balalajky, pak zpěv umlkne a několik hlasu recituje; Kantado, balalajkoj, poste la kantado silentiĝas kaj kelkaj voĉoj recitas:*

Malamikete kado, kado,  
jam temp esta.  
Malamikeco falu, falu,  
estas jam tempo.

*Zpěv, hra na balalajky je silnější a do veselé nálady studentů výkřiky – La kantado, la ludado de balalajkoj estas pli forta kaj en la gaja amuziĝo de l' studentoj aŭdiĝas voĉoj:*

Vivu la lingvo universala, vivu!

La rakontanto: La patrino jam de longe traktis sian unue naskitan filon pro lia serioza konduto kiel plenaĝulon. Pro tio ŝi serioze rigardis ankaŭ lian universalan lingvon. Volonte ŝi partoprenis lian revon pri paco inter popoloj. Alie la patro. Malrevema li estis. Li konis nur laboron kaj devon kaj ĝian ekzaktan plenumon. Tial li ne ŝatis la utopiaĵojn de l' filo.

La p-ro: Ludoviko, vi nun foriros al Moskvo. Vi studos en la universitato medicinon. En ĉiu klaso de l' gimnazio vi estis ĉiam la plej bona lernanto kaj mi scias, ke vi bone sukcesos ankaŭ en la universitato. Viaj profesoroj laŭdegas viajn kapablojn kaj ili antaŭdiras al vi brilan karieron. Sed estas afero, kiu min maltrankviligas.

Zamenhof: Ĉu mia lingvo?

La p-ro: Jes, via utopio. Ĉiu homo devas havi firman celon, kaj...

Z.: Sed, paĉjo, ĝuste la universala lingvo ja estas la celo de mia vivo. Ĉu fakto de hodiaŭ estas utopio de hieraŭ.

La p-ro: Jes, bela argumento. Sed ne forgesu, ke ne ĉiu utopio de hodiaŭ fariĝos fakto de morgaŭ. Post tri-kvar jaroj vi ĝin priidos. Krome, vi volas fariĝi kuracisto kaj ne ĉarlatano. Ne decas al homo serioza okupiĝi pri utopiaj, flankaj aferoj.

Z.: Sed, patro, ne estas ja eble, elŝiri el la koro, kio ĝin plene okupas. Elŝiru ĝin kaj vi elŝiros la koron mem!

La p-ro: Nu bone. Jen mia propono: donu al mi ĉiujn viajn kajerojn, kiuj enhavas la gramatikon, la vortarojn kaj ekzercojn de via . . . nu hm. . . de via lingvo. Mi redonos ilin al vi, kiam vi revenos kun doktora diplomo.

Z.: Paĉjo, ne postulu tion, tro multe vi postulas.

La p-ro: Estas mia patra devo zorgi pri via estonteco. Krom tio, promesu, ke vi ne okupiĝos pri la utopio dum via universitata studado. Kiam vi revenos, vi povos sekvi vian koron, se ankaŭ tiam vi pensos same kiel nun: tiam vi estos memstara kaj libera. Unue pano, poste idealo!

\*\*\*\*\*

La rakontanto: Kruela estis la postulo de l' patro. Sed kiu patro, zorgema pri la bonfarto de sia amata filo, agus alie? La juna studanto obeis la patron, li donis al li, kion li postulis: sian koron. La patro ligis la kajerojn per dika ŝnuro. La pakaĵo malaperis en lia ŝranko. La filo forveturis. Li provis plenumi sian promeson: ne pensi pri sia lingvo. Li vagadis tra la miltura blanka Moskvo kiel homo sen animo: ĝi restis en la ŝranko en la eluzitaj kajeroj. Nur du jarojn li restis en Moskvo, ĉar liaj gepatroj transloĝiĝis Varsovion, kie li daŭrigis sian studadon. Kiam li revenis hejmen, liaj unuaj vortoj estis: liaj kajeroj! La patrino forturniĝis, por eviti respondon. Ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj. La filo

komprenis: la patro bruligis ĉion. . . La jaroj pasis, sed ne pasis la idealo ekĝerminta en lia infana koro. Ĉu mirinde, ke liaj planoj kaj revoj fariĝis la planoj kaj revoj ankaŭ de lia fianĉino?

La fianĉino de Z.: Nu, ĉu la patro redonis al vi la kajerojn?

Z.: Ne. Mia kelkjara laboro forbruligita! Mi opiniis ĉion perdita. Mi rigardis en la abismon de malespero: antaŭ mi estis la vivo, sed vivo sencela, senenhava.

La fianĉino: Tiel profunde vi amis vian lingvon?

Z.: Jes, tiel profunde mi amis ĝin . . . kaj. . . tiel profunde . . . mi amas vin. Nun miaj koro kaj animo apartenas al vi ambaŭ.

La fianĉino: Ho vi malfidela uleto. Do ne al mi sola? Ĉu nur per parto mi kontentiĝu?

Z.: Mia kara, ne tiel parolu! Mia amo al vi ambaŭ estas senlima, do ankaŭ via parto estas senlima.

La fianĉino: Jen kiel vi scias elturniĝi.

Z.: Karulino, ĉu vi ĵaluzas je mia lingvo?

La fianĉino: Nu, se vi mem konfesas, ke via koro ne apartenas al mi sola, sed al ni ambaŭ? Diru, kiu virino ne ĵaluzus?

Z.: Eble ĉiu, sed ne vi, ĉar vi estas escepto el la regulo.

La fianĉino: Ho vi flatulo! Sed vi ja ne rekonas esceptojn ĉe viaj reguloj!

Z.: En mia lingvo certe ne, sed ĉe virinoj jes. Mia kara, ne parolu tiel. Parolu serioze, ĉar tiu ĉi demando devas esti klara inter ni. Ne eble estas forigi, kio pulsas en ĉiu mia fibro, kio fariĝis mia sorto, kion metis en miajn manojn la destino mem.

La fianĉino (*ridas-smĉje se*): Ho, vi savonto de la mondo! Vi stultuleto! Ĝuste pro viaj planoj kaj revoj mi amas vin. Ho kiel seriozaj kaj belaj ili estas. Mi amas ja ilin same kiel vi. Ne riĉaĵojn mi serĉis, ne agrablaĵojn kaj vantaĵojn de l' vivo, sed riĉan vivon spiritan.

\*\*\*\*

La rakontanto: Zamenhof trovis fidelan edzinon, senlacan helpantinon, ofereman kamaradinon. Ŝia karaktero estis pura kaj klara kiel kristalo. Kan virinon li bezonis, tian li trovis. Ilia vivo estis plena je laboro kaj oferemo portataj de komuna espero kaj reciproka helpemo. Senpretenda kaj tre modesta estis ilia vivo. Ja eĉ la mizero estis dum longaj jaroj gasto de l' junaj geedzoj. Mirinda estas la homo, homo esperanta. Pasis preskaŭ dudek jaroj kaj Zamenhof, veturanta al la kongreso en Bulonjo sur Maro, la unua Universala Esperanto-Kongreso, trankvile rakontas al sia kunvojaĝanto pri sia ĝisnuna vivo kvazaŭ pri sonĝo peza kaj malagrabra . . . kaj la radoj de l' vagono regule taktis liajn vortojn.

La kunvojaĝanto de Z.: (*gram. Deska: jedoucí vlak; disko: veturanta trajno*) Jen la eterne ripetiĝanta sorto de malriĉuloj. Nu, Majstro, ĉu vi tamen trovis fine eldoniston por via unua lernolibro?

Z.: Ne. Al mia fianĉino mi klarigis la tutan esencon de mia ideo kaj la planon de mia estonta agado. Kaj mi demandis ŝin, ĉu ŝi volas ligi kun mi sian sorton. Ŝi ne sole tute konsentis, sed ŝi donis al mia tuta dispono la sumon da mono, kiun ŝi posedis. Fine mi mem eldonis en julio de la jaro mil-okcent-okdek-sep miajn unuajn kvar broŝurojn en lingvoj rusa, pola, germana kaj franca.

La kunvojaĝanto: Vere, brava, kuraĝa fianĉino.

Z.: Esperanto baldaŭ forglutis la pli grandan parton de la mono de mia edzino; la tutan reston ni baldaŭ formanĝis, ĉar la enspezoj de mia kuracista praktiko estis terure malgrandaj. Du jarojn poste mi restis sen kopeko! Tre malĝoja estis tiam mia vivo. Mi devis forlasi

Varsovion kaj serĉi mian panon en la alia loko. Mia edzino devis forveturi kun mia infano al sia patro. Sed mia espero min terure trompis. Miaj tieaj enspezoj ne sole ne donis al mi eblecon nutri mian familion, sed eĉ por mi mem ili ne sufiĉis, malgraŭ mia tremodesta vivado. Mi simple kaj litere, ofte, ne havis eĉ kion manĝi; tre ofte mi restadis sen tagmanĝo.

La kunvojaĝanto: Nekredeble! Terura vivo!

Z.: Fine mi ne povis jam pli elteni kaj mi devis konfesi al mia edzino la tutan mian staton. Mi estis tiam ankoraŭ tro fiera, por akcepti de iu monan helpon, tamen la insistaj petoj de mia edzino devigis min akcepti monan subtenadon de mia bopatro, kiu elspezis por mi tre multe da mono.

La kunv. : Ho, nobla, tre nobla viro.

Z. : Kun nova espero mi venis Varsovion. Sed ankaŭ tiun ĉi fojon la espero min trompis. Miaj enspezoj kiel okulisto tute ne pligrandiĝadis, miaj ŝuldoj kreskadis. Fine mi transloĝiĝis kun mia familio al Grodno. Sed ankaŭ tie mi devis prenadi subtenon de mia patro. Post kvar jaroj mi denove revenis Varsovion.

La kunv. : Jes, multaj homoj eĉ ne scias, kiel senzorge ili vivas.

Z. : La stato de mia animo estis tiam terura. Mi sentis tre bone, ke tio ĉi estas mia lasta provo, kaj se ankaŭ nun ne sukcesos al mi, mi estas perdita. En la daŭro de la unua jaro mi preskaŭ frezeziĝis de malespero. Sed fine, dank' al la lasta streĉo de mia energio, la sorto komencis esti por mi pli favora. Mi estas savita. Post multaj jaroj de granda suferado kaj batalado mi nun fine ricevis pli trankvilan vivon, kaj havas tute sufiĉan panon por mia familio, kvankam mi devas vivi tre modeste kaj kalkuli ĉiun kopekon. Mi loĝas en unu el la plej malriĉaj stratoj de Varsovio, miaj pacientoj estas homoj malriĉaj kaj pagas al mi tre malmulte. Mi devas akceptadi tridek ĝis kvardek pacientojn ĉiutage, por havi de ili tiom, kiom aliaj kuracistoj havas de kvin ĝis dek pacientoj. Tamen mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam nenies helpon.

\*\*\*\*\*

La rakontisto: Jen viro, kiu pene perlaboris la panon por sia familio, kiu sidadis longe en la nokto laborante ne por sia propra bonfarto, sed por la bono de l'homaro. Al tiu ĉi malriĉa viro proponis lia amiko kaj pli feliĉa kolego, okulkuracisto Javal [ĵaval] la sumegon de preskaŭ kvaronmilionoj da frankoj, kondiĉe, ke li rompos la regulon: Por unu sono unu litero, kaj forigos el la alfabeto la supersignitajn literojn. Tiu ĉi malriĉa viro rifuzis, obeante sian iaman deklaron, ke esperanto ne estas lia propraĵo. Tiun ĉi modestan viron, kies frakon ornamis ordeno de la Honora Legio, atendis en Bulonjo sep-cent amikoj-esperantistoj el dudek landoj, kiuj entuziasme ovaciis sian majstron. Kaj kiam li, iom tremanta kaj forte ekscitita, ekstaris sur la estrado, la bruanta kaj aplaŭdanta kongresanaro silentiĝis ... (*deska: potlesk; disko: aplaŭdo!*) .

Zamenhof (*Krioj: Vivu Zamenhof! Vivu Esperanto!*) Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas,

(*Aplaŭdado!*)

Sankta estas por ni la hodiaŭa tago. Modesta estas nia kunveno; sed tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelo, sed senteblaj por ĉiu animo sentema: la sonoj de io granda, kio nun naskiĝas.

(*Aplaŭdado!*)

Ni ĉiuj staras sur fundamento neŭtrala, ni ĉiuj estas plene egalrajtaj, ni ĉiuj sentas nin kiel membroj de unu nacio, kiel membroj de unu familio, kaj la unuan fojon en la homa historio ni, membroj de la plej malsamaj popoloj, staras unu apud lia ne kiel fremduloj, ne kiel konkurantoj, sed kiel fratoj. . .

(Aplaŭdado!)

En tiu ĉi solena momento mi sentas la deziron faciligi la koron per ia preĝo. Sed tiel same kiel mi en la nuna momento ne estas naciانو, sed simpla homo, tiel same mi ankaŭ sentas, ke en tiu ĉi momento mi ne apartenas al ia nacia aŭ partia religio, sed mi estas nur homo. Al tiu alta morala Forto, kiun sentas en sia koro ĉiu homo, mi turnas min kun mia preĝo:

Al Vi, ho potenca senkorpa mistero,  
Fortego, la mondon reganta,  
Al Vi, granda fonto de l'amo kaj vero  
Kaj fonto de vivo konstanta,  
Al Vi, kiun ĉiuj malsame prezentas,  
Sed ĉiuj egale en koro Vin sentas,  
Al Vi, kiu kreas, al Vi kiu reĝas,  
Hodiaŭ ni preĝas.

\*\*\*\*

Al Vi ni ne venas kun kredo nacia,  
Kun dogmoj de blinda fervoro:  
Silentas nun ĉiu disputo religia  
Kaj regas nur kredo de koro.  
Kun ĝi, kiu estas ĉe ĉiuj egala,  
Kun ĝi, la plej vera, sen trudo batala,  
Ni staras nun, filoj de l'tuta homaro  
Ĉe via altaro.

\*\*\*\*

Homaron Vi kreis perfekte kaj bele,  
Sed ĝi sin dividis batale;  
Popolo popolon atakas kruele,  
Frat' fraton atakas ŝakale,  
Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera,  
Aŭskultu la voĉon de l'preĝo sincera,  
Redonu la pacon al la infanaro  
De l'granda homaro!  
Ni ĵuris labori, ni ĵuris batali,  
Por reunuigi l'homaron.  
Subtenu nin, Forto, ne lasu nin fali,  
Sed lasu nin venki la baron;  
Donacu Vi benon al nia laboro,  
Donacu Vi forton al nia fervoro,  
Ke ĉiam ni kontraŭ atakoj sovaĝaj  
Nin tenu kuraĝaj.

\*\*\*\*

La verdan standardon tre alte ni tenos:  
Ĝi signas la bonon kaj belon.  
La Forto mistera de l' mondo nin benos,  
Kaj nian atingos ni celon.  
Ni inter popoloj la murojn detruos,  
Kaj ili ekkrakos kaj ili ekbruos,  
Kaj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero  
Ekregos sur tero.

\*\*\*\*

Ni konsciu bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne Francoj kun Angloj, ne Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj. Benata estu la tago, kaj grandaj kaj gloraj estu ĝiaj sekvoj.

*/aplaŭdado!!!*

La parolisto : Finiĝis la festotagoj de l'unua Universala Kongreso, finiĝis koncertoj kaj balo, finiĝis ekskursoj kaj kunsidoj kaj komenciĝis tagoj de malbrua laboro de centoj kaj miloj da nekonataj pioniroj laborantaj por pli bela estonteco de l'homaro. Malrapide iras antaŭen la homa kulturo, paŝo post paŝo. Malfacile kaj pene naskiĝas dum noktoj sendormaj novaj ideoj en la koro kaj animo de benitoj. Sed milionoj da homoj ĝuas la fruktojn de la pioniroj, kies vivo estas longa ĉeno da espero kaj duboj, streĉo de ĉiuj fortoj kaj malsatado. Jen la sorto de la plej kuraĝaj, de la plej bonaj, de la unuaj. Zamenhof apartenis al ili.

\*\*\*\*

Himno esperantista, himno nacia.

Th.Kilian.  
9-11-35.

Rim.: La interparolado en la vagono estas skribita laŭ privata letero de Zamenhof al A. Michaux, prezidinto de la Bulonja grupo esperantista kaj organizinto de la 1-a UK-o, la fino, laŭ parolado de Z. ĉe la 1-a UK-o.